

T.C.

W. B. Treadwell

Vol. 2

NOVEMBER, 1907

No. 4

W. B. Treadwell



A Journal of the
International Language

2,108-6

AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

Per Copy, Ten Cents
Per Year, One Dollar

1239 MICHIGAN AVENUE
CHICAGO, U. S. A.

AMERIKA ESPERANTISTO

La plej malnova kaj la plej vaste vendata revuo esperantista en Nord-Ameriko. La Amerikanoj aĉetas per la poŝto!

The oldest and most widely-circulated Esperanto magazine in North America. Americans are mail-order buyers!

Advertising Rates

Anonprezoj

The following advertising prices are based on the average circulation during the months of July, August and September, 1907. They are somewhat lower than those of other journals of equal quantity and quality, the aim being to fix such prices and afford such service that the seller of any worthy article of general use can *profit* by our space:

La jenaj anonprezoj estas kalkulitaj laŭ la disvendado meznombra de eldonoj julia, aŭgusta, kaj septembra, 1907. Ili estas iom malpli altaj, ol tiuj de aliaj gazetoj de egale bona kvalito kaj disvendado, kaj nia celo estas, fiksi tiajn prezojn kaj liveri tiajn servojn ke la vendisto de ia taŭga komerĉaĵo en ĝenerala uzado povu *profiti* per nia spaco.

	FIRST INS.	AFTER
Page	\$5.75	3.90
Half-page	3.40	2.20
Third	2.45	1.80
Quarter	1.95	1.45
Eighth	.98	.73
Sixteenth	.61	.39

	UNUAROJON	POSTE
Paĝo	Sm. 12.00	8.00
Duonpaĝo	7.00	4.50
Triono	5.00	3.75
Kvarono	4.00	3.00
Okono	2.00	1.50
Deksesono	1.25	.70

Address in Correspondence List two months, 25 cents. The higher price for first insertion partially covers cost of electrotype. Advertisers sending their own electros may deduct this amount. The forms are closed on the tenth. Cash with order, except by special time contract.

Adreso en fako korespondada du monatojn, Sm .50 La pli alta prezo por la unua enpreso parte pagas koston de la kupra kliŝaĵo. Anoncontoj sendante siajn proprajn kliŝaĵojn povas deteni la sumon aldonitan. La kompostado finiĝas je la deka de ĉiu monato. Mandaton kun mendo.

No matter what you are selling, if it can be sent by mail and is used by persons of high intelligence and moderate income, our readers will buy of you, for you'll "look good" to them if they see you in one of our pages. Ninety-nine per cent of our readers subscribed by letter. They're mail buyers! Don't go nosing around with a dog and dark lantern hunting "the secret of success." It ain't hid. Select your advertising media with care and an eye for signs of life. Endow all the orphan asylums you please, but when you advertise, trim out the eleemosynary function—demand returns!

684c
A5
v. 2, no. 4-6

LIBRARY OF
THE AMERICAN JOURNAL OF
EUGENICS

AMERIKA ESPERANTISTO

Entered as second class matter June 28, 1907, at the post office at Chicago Illinois

Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
Monthly Magazine of the International Language, Esperanto
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, Ie en la Mondo, Unu Dolaro (Spesmiloj 2.05)
Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, ELDONANTOJ
AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, PUBLISHERS

Redaktoro : **ARTHUR BAKER** : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUMO 2 NOVEMBRO, 1907 NUMERO 4

Bernarr MacFadden, kiu redaktas kaj eldonas revuon pri la scienca kulturo de la homa korpo, *Physical Culture*, oni antaŭ nelonge kondamnis al *dujara mallibereco*. Pro kia terura ofendo kontraŭ la ŝtato? Nur tio, ke li opinias, ke li povas publikigi sciencajn, pure redaktitajn klarigojn pri la seksa rilato. *Honi soit qui mal y pense!* (la malbono estas ĉe tiu, kiu pensas malbonon). Kvankam mi tute ne estas partiano de Sro. MacFadden, kaj tute ne deziras dividi kun li la martiran kronon, mi forte neas la diron

Saĝecon! vi enflugis en la brutojn!

Almenaŭ, se la saĝo flugis tiele, ĝi large maltrafis la azen-virojn kiuj okaze elektiĝas al la trono de juĝisto. Sed, spite la penoj de personoj, kiuj kun pigmea forto amuze svarmas kaj baraktadas kontraŭ la progresado de la homoj, senĉese antaŭen ruladas la mondo! La homaro nek konas nek deziras koni la nomon de la juĝista tiraneto, kiu kondamnis MacFadden. Sed certe la nuntempuloj ne povas kompreni kian honoron faros niaj posteuloj al tiaj bravaj pioniroj kiaj Luther Burbank, Moses Harman^a kaj Bernarr MacFadden.

^aRedaktoro de *The American Journal of Eugenics*. Sro. Harman loĝis kelkajn jarojn en malliberejo.

PRI EKZAMENOJ POR ESPERANTISTOJ

Ekzistas ĉiam en la mondo multaj indaj personoj, kiuj ne povas kontentiĝi pri ia afero rilate sin mem, sen la atesto de aliaj. Geknaboj, ili demandas: "Panjo, ĉu la oreloj estas puraj?" Edzinoj: "Joĉjo, ĉu mi portas la ĉapon rekte?" Fratoj: "Fratino, ĉu decas mia aranĝo de la kravato?" Al mi, kiu fraŭle kaj senzorge trovas tra la mondo kun haroj ne ĉiam zorgege metitaj ĉiu en sia propra loko, tiaj homoj estas objekto de tiu patra zorgo, kiun la ne-ankoraŭa gefilaro ne bezonas. Tiuj el ili, kiuj estas esperantistoj, deziras la ateston de ia aŭtoritato, ke ili portas rekte la gramatikon de Esperanto, ke ili dece kunligas siajn frazojn laŭ la reganta modo, kaj ke ne sin kaŝas post la oreloj iom da forlavinda nacieco.

Tian certigon jam disdonas kelkaj naciaj asocioj, ĝin nomante Atesto pri Kapableco. Sed se la atesto certigas, ke oni havas la kapablon uzi Esperanton pli aŭ malpli senierare, kial necesas, ke la ekzameno fariĝu per nacia lingvo? Ĉu oni deziras atesti ke unu angleparolanto povas, kun helpo de Esperanto kaj sia nacia lingvo, klarigi la penson al alia sameparolanto? Ĉar tia atesto, por posedi valoron, devas atesti, ke la atestulo povas skribi, paroli kaj kompreni la lingvon internacian, ŝajnas al mi, ke ĝi devas esti ricevata nur per lingva inkvizicio farata de esperantistoj kiuj ne estas samnacionoj kun la kandidato. Kaj anstataŭ iome ridetinda kutimo fari la ekzamenon angle, aŭ france, aŭ germane, ĝi fariĝus, kompreneble, per Esperanto.

Por mi persone, estas tute egale. La ceremonio ne povus forpreni de mi la ĝenan emon pendigi la akuzativan signon ĉiam tie, kie ĝi ne necesas. Kaj se eble, post turmentiĝo, oni permesus al mi la uzon de ia titolo, tio nur incitus la popolamason pli forte ĥori "jaj! jaj!" kiam miaj piedoj forglitas pro ia bananaŝelo retorika. Sed pro amo al miaj zorgatoj, kiujn nur ekzameno povas feliĉigi, mi demandas: Kial ne ekzamenon por esperantistoj, pri Esperanto, per Esperanto?

LA MORTO DE ARTURO

Laŭ Sir Thomas Mallory esperantigis William George Adams, 12,908.

Tiam oni konsentis ke Reĝo Arturo kaj Sir Mordredo, renkontu inter siaj armeoj kaj ke ĉiu el ili alportu dekkvar personojn; kaj tiel venis la informo al Arturo. Li diris: "Mi ĝojas ĉar tio ĉi fariĝos." Kaj li iris en la kampon sed kiam Reĝo Arturo estas alironta li avertis al la tuta armeo "Zorgu se vi vidas iun glavon elingigita ke vi antaŭeniru fortege kaj mortigu tiun perfidulon Sir Mordredon ĉar mi neniel konfidus je li." Tiel same Sir Mordredo avertis al sia militistaro, "Se iam vi vidas glavon el la ingo, vi antaŭeniru rapidege kaj mortigu ĉiun kiu staras antaŭ vi; mi neniel konfidus je tiu ĉi kontrakto ĉar mi bone scias ke mia patro venĝos sin al mi." Kaj tiam ili renkontis kaj agordiĝis bone kaj oni alportis vinon kaj ili trinkis.

Tiam venis malgranda serpenteto el arbeto kaj mordis kavaliron sur la piedo. Kiam la kavaliro sentis la mordon li malsupren rigardis kaj vidis la serpenteton kaj eliris la glavon por mortigi ĝin, sen ia pripenso. Sed kiam la militistoj de ambaŭ partioj vidis la glavon elingigita, ili sonigis la militkornojn kaj trumpetojn kaj kriegis laŭtege.

Tiel ambaŭ armeoj proksimiĝis, kaj Reĝo Arturo prenis ĉevalon kaj diris, "Ho ve, la malfeliĉa tago!" kaj tiel rajdis por plenumi sian devon. Tiel same faris Sir Mordredo kaj neniam estis vidita pli terura batalego en ia kristana lando; ĉar tie okazis kuregado kaj rajdado, defendado kaj frapado, kaj multajn koleregajn vortojn ili parolis unu al alia kaj donis multajn mortajn bategojn.

Ĉiam reĝo Arturo rajdis tra la vicoj de Sir Mordredo kaj agis tie kuraĝe laŭ la devo de nobla reĝo kaj neniam la espero lin forlasis. Sir Mordredo ankaŭ tiun tagon kiel brava kavaliro sin metis en grandan danĝeron, kaj tiel ili bataladis dum la tuta longa tago, kaj neniam haltis ĝis kiam la nobelaj kavaliroj estas kuŝigitaj sur la malvarma tero. Konstante ili bataladis ankoraŭ ĝis kiam la nokto estis preskaŭ veninta, kaj tiam cent mil kuŝis malvivaj sur la kampo.

Tiam Reĝo Arturo estis kolerega senmezure ĉar li vidis siajn partianojn tiel mortigitaj for de li. La reĝo rigardis ĉirkaŭ lin kaj tiam li sciigis ke el lia tuta armeo kaj el liaj bonaj kavaliroj restas vivaj nur du kavaliroj, kiuj estas Sir

Lukano la pokalportisto kaj Sir Bedivero lia frato, kaj ili estis terure vunditaj.

“Jesuo kompatu!” diris reĝo Arturo. “Kio okazis al miaj noblaj kavaliroj? Ho ve, kian doloran tagon mi vidas! nun mi estas veninta al mia finiĝo. Ho Dio, mi nur deziras koni kie estas tiu perfidulo Sir Mordredo, kiu kaŭzis tian malfeliĉecon.”

Tiam vidas Reĝo Arturo kie Sir Mordredo apogas sur sia glavo inter granda amaso da mortintaj viroj. “Nun donu al mi mian lancon,” diris reĝo Arturo al Sir Lukano, “ĉar jen mi vidas la perfidulon kiu faris la tutan malfeliĉecon.”

“Sinjoro, lasu lin vivi,” diris Sir Lukano, “ĉar li estas malfeliĉa, kaj post tiu ĉi bedaŭrinda tago vi povos vin bone venĝi al li. Mia bona sinjoro, rememoru vian songon de la lasta nokto, kaj kion la spirito de Sir Gavajno diris al vi; sed Dio laŭ sia granda boneco ĝis nun konservis al vi la vivon, tial, pro Dio, mia sinjoro, haltu; ĉar, danke al Dio, ni gajnis la batalon; jen estas nitri vivaj kaj kun Sir Mordredo estas neniu viva, kaj se vi haltos nun, tiu ĉi malbonega tago de la sorto estos finita.”

“Aŭ vivo aŭ morto okazu al mi,” diris la reĝo, “mi vidas lin tie solan kaj li neniam forkuros el miaj manoj, ĉar neniam mi havos pli bonan okazon renkonti lin.”

“Dio vin helpu,” diris Sir Bedivero.

Tiam Reĝo Arturo prenis sian lancon per ambaŭ manoj kaj kuris al Sir Mordredo, kriante, “Perfidulo, nun estas veninta via morttago.” Kaj kiam Sir Mordredo aŭdas Reĝon Arturon li kuris al li kun la glavo en la mano kaj tie reĝo Arturo frapis Sir Mordredon per la lanco sub la ŝildo tra la korpo pli ol unu sesfuton. Kiam Sir Mordredo sentis ke li estas ricevinta sian mortvundon li puŝegis sin per la tuta forto kiun li havas laŭ la lanco de reĝo Arturo kaj per la glavo kiun li tenas per ambaŭ manoj li frapis Reĝon Arturo sur la flanko de la kapo, tiel ke la glavo tratranĉis la kaskon kaj la cerbujon.

Tiam falis Sir Mordredo tute malviva al la tero, kaj la nobla Reĝo Arturo falis ankaŭ en sveno sur la teron kaj tie li kuŝis svenanta longatempe. Sir Lukano kaj Sir Bedivero lin levis kaj malforte portis lin inter si al ia malgranda kapelo proksima al la marbordo. Kaj kiam la reĝo estas tie li sentis sin pli kontenta.

Tiam ili aŭdis personojn krei en la kampo. “Nu, vi iru,” diris la reĝo al Sir Lukano, “kaj sciigu al mi kion signifas

tiu bruado en la kampo." Sir Lukano foriris kaj li estis terure vundita en multaj lokoj. Dum li iras li vidas kajaŭskultas per la lunlumo kiel la ŝtelistoj kaj rabistoj estas venintaj en la kampon por forŝteli kaj forrabi de multaj nobelaj kavaliroj iliajn broĉojn kaj globetojn kaj multajn multekostajn ringojn kaj multajn riĉajn juvelojn. Kaj tiujn kiu ankoraŭ ne estas mortintaj ili mortigas por posedi iliajn armaĵojn kaj riĉaĵojn. Kiam Sir Lukano komprenis tiujn farojn li venis al la reĝo kaj rakontis al li ĉion kion li aŭdis kaj vidis.

"Tial, laŭ mia konsilo," diris Sir Lukano, "taŭgas ke ni vin alportu al ia urbeto."

"Tiel mi volas," diris la reĝo.

"Sed mi ne povas stari, mia kapo tiel doloras al mi. Ho, Sir Lanceloto," diris Reĝo Arturo, "tiun ĉi tagon mi tre bezonis vin; ho ve, mi bedaŭras ke mi estas kontraŭ vi, ĉar nun mi ricevis mian morton, pri kiu Sir Gavajno avertis min en mia sonĝo."

Tiam Sir Lukano levis Reĝon Arturon ĉe unu flanko, kaj Sir Bedivero ĉe la alia flanko, kaj dum la levado la reĝo svenis. Kaj pro la levado Sir Lukano falis en sveno, kaj tiam lia nobla koro rompis. Kiam Reĝo Arturo ree konsciĝis, li vidas Sir Lukanon, kiel li kuŝas ŝaŭmanta ĉe la buŝo. "Ho ve," diris Reĝo Arturo, "tio ĉi estas al mi tre dolora apero, vidi tiun ĉi bravan kavaliron tiel morti pro mi, ĉar li kiu pli multe bezonis helpon ol mi volis helpi min. Ho ve, li ne plendis, lia fidela koro tiel volis servi min. Jesuo kompatu lian spiriton!"

Ankaŭ Sir Bedivero ploris la morton de sia frato. "Ĉesu tiun ĉi ploradon kaj plendadon," diris Reĝo Arturo, "ĉar ĝi ne utilas al mi; sed konu vi ke se mi mem estus vivonta, la morto de Sir Lukano min malĝojigus konstante. Sed mia tempo foriras rapide," diris Reĝo Arturo, al Sir Bediviro, "tial vi prenu Ekskaliburon, mian bonan glavon, kaj iru kun ĝi al la akvobordo; kaj kiam vi estas veninta tien, mi petas al vi, ĵetu mian glavon en tiun akvon kaj revenu kaj diru al mi kion vi vidis tie."

"Mia sinjoro," diris Sir Bedivero, "vian ordonon mi plenumos kaj tuj alportos al vi sciigon." Tiam Sir Bedivero foriris kaj dum la irado li rigardas tiun belan glavon kies tenilo estis tute el multekostaj juveloj. Kaj li diris al si: "Se mi ĵetus tiun ĉi riĉan glavon en la akvon, pro tio nenia profito venus, sed nur malprofito kaj malutilo." Tiam Sir

Bedivero kaŝis Ekskaliburon sub arbo, kaj kiel eble plej baldaŭ li venis al Reĝo Arturo kaj diris ke li estis ĉe la akvo kaj ĵetis la glavon en la akvon. "Kion vi vidis tie?" demandis la reĝo. "Sinjoro," li diris, "mi vidis nenion krom ondoj kaj ventoj."

"Tio estas malvere dirita de vi," diris la reĝo, "tial vi iru tuj kaj plenumu mian ordonon; pro la amo kiun mi havas por vi, ne evitu ĝin enĵeti."

Sir Bedivero reiris kaj prenis la glavon per la mano; sed tiam li opiniis ke estus kulpe kaj hontinde forĵeti tiun gloran glavon; kaj li ree kaŝis ĝin kaj reveninte, diris al la reĝo ke li estis ĉe la akvo kaj plenumis la ordonon.

"Kion vi vidis?" diris la reĝo.

"Sinjoro," diris li, "mi nur vidis la akvon ludadi kaj la ondojn ruladi."

"Ha, perfidulo, malfidela," diris Reĝo Arturo, "nun vi perfidis min du fojojn; kiu opinius ke vi, kiu estas de mi tiel amata, kaj estas nomata nobla kavaliro, perfidus min pro la riĉa glavo? Sed nun reiru tuj, ĉar via longa haltado tre endanĝerigas mian vivon, ĉar mi estas malvarmuminta; sed se vi ne agos ĝuste kiel mi ordonas al vi, se mi povos vin vidi, mi mortigos vin per miaj propraj manoj, ĉar pro mia riĉa glavo, vi volas vidi min morti."

Tiam Sir Bedivero foriris kaj iris al la glavo, kaj prenis ĝin kaj iris al la akvobordo, kie li ligis la zonon ĉirkaŭ la glavon. Li svingis la glavon kaj ĵetis ĝin en la akvon kiel eble plej malproksime, kaj jen venis brako kaj mano super la akvon kaj kaptis ĝin kaj trifoje svingis ĝin en la aero. Kaj tiam la mano malaperis kun la glavo en la akvon.

Sir Bedivero venis ree al la reĝo kaj rakontis al li kion li vidis. "Ho ve," diris la reĝo, "mi timas ke mi atendis tie ĉi tro longatempem." Tiam Sir Bedivero prenis Reĝon Arturon sur la dorson kaj iris kun li al la akvobordo, kaj kiam ili venis al la akvobordo, tie ĉe la bordo naĝas malgranda ŝipeto, en kiu sin trovas multaj belaj virinoj; kaj inter ili estas unu reĝino; ĉiuj portis nigrajn kapuĉojn kaj kiam ili vidis Reĝon Arturon ili ploris kaj kriis.

"Nun metu min en la ŝipeton," diris la reĝo. Tion li faris zorge, kaj tri reĝinoj ilin renkontis kaj la tri reĝinoj sidigis kaj unu prenis la kapon de Reĝo Arturo sur sian brakon. Tiam diris tiu reĝino, "Ha, kara frato, kial vi restis for de mi tiel longatempem? Ho ve, tiu ĉi vundo sur via kapo tro malvarmumis." Tiam ili forremis de la tero; kaj Sir Bed-

ivero vidis ili ĉiuj foriri de li. Tiam li kriis, “Ha, mia Reĝo, Arturo, kio okazos al mi nun kiam vi estas foririnta de mi kaj lasas min solan inter miaj malamikoj?”

“Estu kontenta,” diris Reĝo Arturo, “kaj faru tiel bone kiel vi povos, ĉar mi ne povas helpi vin; mi nun iras en la valon Avalon por ke mia dolorega vundo saniĝu; se vi neniam plu aŭdus pri mi, preĝu por mia spirito.”

Sed ĉiam la reĝinoj kaj la virinoj tiel ploradis kaj kriadis ke estis malĝojige ilin aŭdi, kaj baldaŭ kiam Sir Bedivero ne povis plu vidi la ŝipeton li ploris, kaj kriis, kaj tiam foriris en la arbaron.

OPORTUNO

Estas en la Unuigitaj Ŝtatoj ne malpli ol kvar grandaj grupoj da Esperantistoj. Ĉi tiuj kredeble meznombros mil. *The North American Review* ĵus publikigis sian aron da mil kvar cent. Nura okulĵeto montras ke preskaŭ ĉiuj la ŝtatoj reprezentigas. *The Christian Endeavor World*, semajna gazeto nacie cirkulita inter gejunuloj, havas nomaron de unu mil. Ne estas kredinde ke la du nomaroj enhavas kvincent nomojn komunajn. La tria aro konsistas el la abonintoj al la *American Esperanto Journal* de Boston, kies eldonaĵoj estas regule almenaŭ mil kaj kiu reprezentas la plej agemajn propagandistojn, speciale en la orienta parto de nia grandega lando. La aro de *Amerika Esperantisto*, tiu fervora organo de Ĉikago, sendube diferencas grande je tiu de la alia kaj enhavas pli multe da okcidentaj nomoj. Enrigardante de ĉi tiujn nomarojn oni estas pravigata en la kredo ke ni numeras tri mil en la U. S. krom kiel multaj aliaj parte interesitaj kaj nur ekagemiĝantaj.

Nun *The North American Review* petas ke sia nomaro iĝu dividita en ŝtataj kaj regionaj asocioj. Nia lando certe estas tro granda por nur unu senparta nacia asocio. Pravas ke estu fortika kaj sukcesplena respondo; la ursido necesas lekiĝi en formon. Se volontaj oficistoj antaŭenpaŝos en ĉiu ŝtato, ili povos fari mirindaĵojn per loka korespondado, interkoniĝado kaj eĉ malmultekostaj preseldonaĵoj, cirkuleroj kaj tiel plu, ĝis kiam ili poviĝos subteni delegitojn al nacia kongreso.

Ne estas necese ke estu ia malglateco kaŭze de tio, ke *The American Esperanto Journal* estas eldonata de la American Esperanto Society; kaj la anoj de tiu societo devige

elpagas monon por subteni ĝin, dum la tempo kiam la Society of the North American Review elspezigis nenion al siaj anoj. La du povas en estonta tempo unuiĝi (a) per faro anecon de du specoj, (b) per faro de abono al la ĵurnalo propravola aŭ (c) en tia maniero per kiu la U. S. intencas administri Filipinujon,—fidi la saĝon de la venonta generacio. Kial ne fari tiele, aparte en tia filantropa movo kia tiu ĉi? Ankaŭ se Esperanto dece sukcesos, ĝia sukceso estos tiel ega kaj lavanga ke ĝi balaos niajn piedojn el sub ni aŭ almenaŭ rompos ĉiun malnovan ŝipon el ĝiaj ligiloj.

Mi opinias, tial, ke je la eldono de la oktobra *Review*, Oportuno haltis apud niaj pordoj kaj ni devas rapidi koni ĝin. Unuiĝo estas necesa por nia estonta vivado. Ni ne estu antikvaj grekoj!

W. B. Sterrett, Washington, Pa.

TRI FRATOJ

El "Elektitaj Fabeloj de Fratoj Grimm," tradukitaj de Kabe kaj eldonitaj de Moller & Borel, Berlin

Estis iam homo, kiu havis tri filojn. Ekster domo, en kiu li loĝis, li posedis nenion. Ĉiu el la filoj dezirus heredi ĝin, sed la patro amis ĉiujn same kaj li ne sciis kion fari por ne esti maljusta; plej simple estus vendi la domon kaj dividi la monon, sed li ne volis tion fari, ĉar ĝi estis hejmo de liaj patroj kaj prapatroj. Fine li trovis rimedon kaj diris al la filoj: "Iru en la mondon, provu viajn kapablojn kaj lernu ĉiu metion; kiam vi revenos, tiu ricevos la domon, kiu faros plej bonan majstroverkon."

La filoj konsentis. La plej aĝa decidis fariĝi forĝisto, la dua barbiro, la tria skermisto. Ili difinis la tagon de la reveno kaj foriris. Feliĉe ĉiu trovis bonan majstron kaj plene ellernis sian metion. La forĝisto subforĝis la ĉevalojn de la reĝo kaj pensis: "Farita estas la afero, la domo estas via." La barbiro razis nur altrangulojn kaj pensis la samon. La skermisto ricevis multe da batoj, sed li kunpremis la dentojn kaj ne ĉagreniĝis, ĉar li pensis: "Se vi timos batojn, vi neniam ricevos la domon." Kiam pasis la difinita tempo, ili revenis al la patro; sed ili ne sciis kiamaniere trovi plej bonan okazan por montri sian arton, sidis kune kaj interkonsiliĝis. Subite ili ekvidis leporon, trukurantan la kampon.

"Jen ĝi venas kvazaŭ invitita", diris la barbiro, prenis

sian pladeton kaj saponon, ŝaumigis ĝin, ĝis la leporo proksimiĝis, poste dum ĝia kurado saponis ĝin kaj razis ĝian barbon; li ne vundetis ĝin, nek kaŭzis doloron.

“Tio plaĉas al mi,” diris la patro, “se viaj fratoj ne estos pli lertaj, la domo estas via.”

Post momento galope preterveturis sinjoro en kaleŝo “Nun vi vidos, patro, kion mi scias” diris la forĝisto, kuris al la kaleŝo, deŝiris de la galopanta ĉevalo la kvar hufiferojn kaj alnailis kvar novajn.

“Brave!” diris la patro, “vi ne estas malpli lerta ol via frato; mi ne scias, al kiu mi devas doni la domon.”

La tria diris: “Permesu ankaŭ al mi montri mian arton.” Ekpluvis, la skermisto eltiris la spadon kaj ek-svingis ĝin super la kapo; neniu guto falis sur lin. La pluvo pligrandiĝis kaj fine la akvo fluis kvazaŭ el kuvo; la skermisto svingis la spadon pli kaj pli rapide kaj restis tute seka kvazaŭ sub tegmento.

Ekmiregis la patro vidante tion kaj diris: “Vi faris plej bonan majstroverkon, la domo estas via.”

La du aliaj akceptis la verdikton sen protesto. Ĉar ĉiuj tri amis unu la alian, ili restis en la domo kaj ĉiu laboris en sia metio; kiel lertaj specialistoj ili havis grandan klientaron. Ili vivis feliĉe ĝis maljuna aĝo, kaj kiam unu malsaniĝis kaj mortis, la du aliaj tiel ĉagreniĝis, ke ili ankaŭ malsaniĝis kaj mortis. Ĉiujn tri, ĉar ili estis tiel lertaj kaj tiel amis unu la alian, oni metis en unu tombon.

LA BUFO

El “Diversaĵoj,” de Clarence Bicknell

Kial ni mortigas niajn amikojn? Kredeble pro manko de sciado. Estus pli bone mortigi la antikvajn superstiĉojn. Foje oni bruligis virinojn kredante ke ili estas sorĉistinoj; nun tia kruela ago ne estas permesata, sed ni mortigas la kreitaĵojn kiuj estas utilaj. Mi pensas pri la bufo. En la kamparo kie mi loĝas, oni kaptas la bufojn, oni trapikas ilin per peco da ligno, oni fiksas la lignon en murruo, kaj la mizeruloj krucumitaj, malrapide mortas. Se oni demandas al kamparano la kialon, li respondas “ĝi ne estas kristano.” Eble la insektoj ĝojas, sed la ĝardenistoj kaj la floroj kaj la legomoj, kiujn ili kulturas suferas, ĉar la bufoj estas iliaj plej bonaj amikoj. La bufo manĝas muŝojn, insektojn,

kelkafoje vermojn kaj multe ŝatas la "milpiedulojn" tiujn oftaĵojn kiuj kunvolvas sin kaj fariĝas rondaj kiel pilolo.

Estas vere ke se niaj hundoj kaptas bufon, ili baldaŭ forlaŝas ĝin, kaj ekŝaumas. Kial? Ĉar la bufo havas sur la dorso kaj aliloke malgrandajn glandojn, plenajn je acida fluidaĵo, kiu ne plaĉas al la hundo, kvankam ne estas veneno. Sed ni povas tuŝi bufon sentime, ĉar ĝi ne povas malutili nin.

La bufo estas vera ekzemplo de ekonomio kaj ŝparemo. Kiam ĝi ŝanĝas kaj deĵetas sian haŭton, kaj sin montras pli bela ol antaŭe pro sia nova vesto, ĝi ne malŝatas ĝin fiereme, kaj ĝin ne malavare donacas, kiel ni, al sia sama specano tion kion ĝi ne plu bezonas, sed ĝi rulas kaj rerulas ĝin por fari pilolon pli grandan ol la milpiedulon kaj englutas ĝin.

Do se ni havas ĝardenon, ni devas protekti la bufojn kaj neniam forpeli ilin; kaj ili rekompencos nin manĝante la malamikojn, kiuj detruas niajn kreskaĵojn.

POR LA RIDETO

Tradukis Max Brodkey.

Oni demandis unu ŝerculon: "Kial do vi ne edziĝas kun via fianĉino se vi reciproke amas unu la alian?" "Tial," respondis tiu, "ke ni tro multe respektas unu la alian."

Unu instruisto deziris plibonigi la patriotajn sentojn de siaj lernantoj; tial li ofte paroladis al ili pri la devoj de bonaj ŝtatanoj kaj, montrante la landstandardon pendantan sur la muro, li demandis ilin "Ĉu vi tute komprenas la utilecon de tiu ĉi standardo tie?" "Certe, sinjoro" respondis unu el la lernantoj kiu konis sian lernejon pli bone ol la valoran de la standardo, "ĝi estas pendigita tie por kaŝi la kotajn makulojn sur la muro."

"Vi parolas kiel malsaĝulo." "Certe; mi ĝin faras por ke vi pli bone konprenu min."

"Ĉu vi iam staris, fininte vian predikon, ĉe la pordo de la preĝejo kiam la popolo elpaŝas eksteren, kaj aŭdis rimarkojn pri via predikaĵo?" demandis unu predikisto la alian. "Jes, sinjoro," tiu respondis, "sed mi promesas al vi ke mi neniam ĝin faros denove."

LA ESPERO

*En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko ;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.*

*Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion :
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.*

*Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj ;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.*

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.*

*Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.*

L. Zamenhof, en *Fundamenta Krestomatio*.

PLIGRANDIGANTE LA KOMERCADON

Ĉiu scias, ke fervojo kreas komercon kiam ĝi eniras en novan lokon kiu antaŭe ne posedas ian fervojon. Oni konfesas, tamen, ke estas tute alia problemo trovi rimedon por pligrandigi komercon en malnova loko kie kelkaj fervojoj jam de longe ekzistas. Tiun ĉi problemon atakas la amerikaj fervojoj, kiuj sukcesas en granda mezuro ĝin solvi. Ĉiam plibonigante siajn metodojn kaj tiel sian servadon, ili, kompreneble, allogas novan komercon. Tiuj ĉi vortoj, tamen, ne sufiĉe klarigas la aferon detale. Tial, la subskribanto, partoprenante en tiu laboro, permesas al si mem citi ekzemplon, sekve:

Antaŭ kvin aŭ ses jaroj, tre malmulte da ovoĵ estis elsendataj el la urbetoj en la suda parto de la ŝtato Ilinoĵo (amerike: *Illinois*) ĉar la fervojaj vagonaroj por komercaĵoj ne enhavas ian vagonon kròm ordinara en kiu lasta la ovoĵ kaj aliaj pereemaj produktoj eble devus kadukiĝi, almenaŭ dum varma vetero. La plej bonaj vendejoj kiuj pagas la plej altajn prezojn, sin trovas en la urbeĵo de Nju-Jorko (amerike: *New York*) kiu estas ĉirkaŭ mil mejloj amerikaj (tio estas 1,609 kilometroj) de la cititaj urbetoj en sud-Ilinoĵo. Vidante kaj koniĝante tiujn cirkonstancojn, la Ilinoĵa Centra Fervojo, kiu ĉiam volonte donas bonegan servadon, entreprenis uzi specialan malvarmigan vagonon, kiu posedas glacio-kestegojn en ĝiaj du ekstremaĵoj. Tiuj ĉi du kestegoj, plenigataj je glacio, tre malvarmigas la internon de tiu vagono, kaj, kredeble, la malvarma aero bone protektas ĉiujn pereemajn entenaĵojn. Estas permesate ke oni enmetu pereemaĵojn en tiun vagonon kiam ĝi pasas ĉiun stacion, se la sendaĵoj devas atingi la urbeĵon Nju-Jorkon. Kauze de la nova servado, multe da kamparanoj kaj vendantoj tuj komencis havigi al si gekokojn kaj sendi ovojn al la orientaj vendejoj supre-cititaj, ĝis nun la nomata fervojo ricevas kaj movas, ordinare, ĉirkaŭ sep-dek (70) vagonojn da ovoĵ, k.t.p., ĉiumonate, el la loko priskribita. Ne nur la fervojo gajnas novajn mon-ricevaĵojn, sed ankaŭ, la kamparanoj kaj vendantoj poviĝas fari novajn negocojn tre profitajn.

Eugene F. McPike,

Esperantisto No. 14,975.

1. Park Row, Chicago, Illinois, U. S. A.

LA KOMERCADO KAJ LA "SPORTO"

Tradukita el *Wilshire's Magazine*

La kreskanta komercigado de la sporto estas neniel nova temo, sed la interrilato ne estas ofte tiel malkaŝe konfesata kiel en la preparadoj farataj en Svedujo por postuli la faman Amerikan Tason.

Laŭ la ĵurnalaro, la postulanto ne estas jaĥtisto, sed bankiero, kiu deklaras, ke la konkuro devas esti rigardata kiel nacia entrepreno. Laŭe, subskribaj listoj estas malfermataj kaj sumoj de .50 ĝis 12,500 spesmiloj estas akceptotaj. La iniciatoroj nun petas la komercistojn pri la konstanto necesa por konstrui la konkurontan jaĥton. Se la sumo postulata ne povas amasiĝi donace, la nomita bankiero garantias la necesan restaĵon. Oni diras ke li malkaŝe klarigas ke lia motivo por fari la provon estas ke li kreu pli intimajn komercajn rilatojn inter Svedujo kaj la Unuigitaj Statoj.

Kompreneble, kelkaj personoj suspektis ke la sinsekvaj provoj de Sir Thomas Lipton por ekkapti la trofeon estis gvidataj pli multe de kaŭzoj aferaj, ol de nura amo al la sporto. Sed en tiu tempo ne estis ĝentile preparoli Lipton alimaniere ol kiel "la kompleza barono" kaj "tutkora sportisto." Tamen, la sveda bankiero faras nenian provon kaŝi la fakton ke lia efektiva celo estas la aferado.

Eble tiu ĉi estas prava. Se, kiel Cecil Rhodes deklaris, la brita standardo estas komerca kreditaĵo, kial fari escepton je la Amerika Taso? Se "patriotismo" englutiĝas en la komercado, kial sortiĝus alie la "sporto"?

ANEKDOTOJ

Esperantigitaj de Otto Haux Mayer

Nelernema Bovino

Ie sur sudusona plantejo la dungitoj de la laktejo havis la kutimon melki kaŭrante laŭ praa modo, ĝis la bienulo enkondukis melkseĝetojn, kune kun alia ilaro. Sed la komenca eksperimento pri la novigaĵo ne estis tuta sukceso. La mallumhaŭtulo, kiu unue ekmarŝis kun la seĝeto, revenis kun diversaj signoj de barakto kaj batado sur sia korpo, kaj kun malplena sitelo.

"Mi ja penegis, sinjora moŝto," li raportis. "Al mi tiu

seĝeto ŝajnis tute taŭga, sed la malbenita bovino nepre ne volas sidigi sin sur ĝi!"

—El *Woman's Home Companion*.

Brinjo. Do vi iros al la enterigo de Flanigan?

Miĉjo. Sed jes, mi iros. Se ni ne iras al enterigoj de aliuloj, kiel ni povas atendi, ke ili venos al niaj?

La Plej Granda Porko

Antaŭ kelkaj jaroj naskiĝis konkuro pri la produkto de grandaj porkoj inter la terkulturistoj de Kansaso. Jen la redakto de unu elpendaĉo, kiu interesis la pasantojn preskaŭ senescepte: "Kiu ajn deziras vidi la plej grandan porkon en Kansaso, bonvolu viziti mian bienon kaj demandi pri mi.—Silas Lowe."

—El *Judge's Library*

Rimedo Por Obligi Monon

"Mirakla financarto ne estas tute limigita al la Nov-Jorka bursa kvartalo," diris Johano E. Wilke, estro de la detektivaro, laŭ *Saturday Evening Post*. "Mi vidis antaŭ ne longe ekzemplon de ĝi, kiu igis min kapturna."

"Unu el la komizoj en la Trezorejo deziris iri ĉe la pilkan ludon. Li havis nur 25 cendojn, la rektan allasan pagon, kaj nenion por tramvoja veturmono."

"Li buŝanoncis, ke li lote vendos siajn 25 cendojn po 2 cendoj. Dek-ok komizoj provis la ŝancon. Unu gajnis la dolarkvaronon por 2 cendoj, sed la spekulacia genietulo havis 25 cendojn por sia bileto, 10 cendojn por veturmono, kaj unu cendon restantan por gazeto posttagmeza."

LA UNULINGVA SOCIETO.

Antaŭ nelonge organizis sin en la urbo Cincinnati unu malgranda societo, sin nomante *The One Language Society*. Sian celon ĝi klarigas jene:

"*The One Language Society* havas la celon malkaŝe diskutadi pri internacia lingvo. La bezono de tia lingvo estas ĝenerale konfesata, sed kiu lingvo devas esti internacia? Ĉu la franca, la angla, aŭ iu alia el la lingvoj jam ekzistantaj? Kaj se tiel fariĝos, kiu el ili? Ĉu estos la latina aŭ la greka? Ĉu nova lingvo devos formiĝi por tiu celo? Se nova lingvo, el kio la dirita nova lingvo estos formata, kaj laŭ kiaj reguloj, aŭ sur kiaj principoj ĝi estos fondata? Por pagi elspezojn de la Societo, estos membriga pago de

25 cendoj ĉiujare. Tiu ĉi ankaŭ pagos por la organo oficiala, la *Monthly Cincinnati*. Se la intereso tion pravigos, la societo komencos la eldonadon de nova ĵurnalo, traktanta la temon de internacia lingvo. Laŭ nia scio, ne estas en la nuna tempo ia gazeto en la tuta mondo traktanta tiun ĉi temon, kvankam Esperanto kaj aliaj individuaj projektoj havas siajn proprajn eldonaĵojn.

“Ni estos dankema pro ia redaktora aŭ ĵurnala noto rilate al nia societo kaj ĝiaj celoj, kaj penados reciproki kiel eble plej multe.

“Ni ankaŭ dankos niajn amikojn pro la sendo de adresoj de kiel eble plej multaj personoj, en la tuta mondo, kiu estas iamaniere interesataj pri internacia lingvo. La celo estas elpensi ian metodon per kiu la diversantaj opinioj kaj projektoj povas kunlabori al komuna celo.—*The One Language Society*, 15 East Seventh Street, Cincinnati, Ohio, U. S. A.”

En ilia serĉo por la magia komprenilo, oni povas nur esperi ke la gvidanta stelo de la Unulingva Societo ĝin direktos al Esperanto. Tio, kion ili tiel formale kaj serioze serĉas jam ne kuŝas en la senforma materialo de la mondo. Ilia laboro ne devas esti krei internacian lingvon, ĉar tiu jam de longe ekzistas. Ili ĉesu la lacigantan fosadon kaj levu la okulojn ĉielen, kaj vidu la rapide plifortiĝantan brilecon de la Verda Stelo. Tiam, la sopirantaj kaj esperantaj homoj povos gaje kanti:

“Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵoj de l' homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.”

EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

Edziĝo Malaranĝita.—Jen estas originala komedioto esperanta, el la skribilo de Vincente Inglada, la konata hispana esperantisto. Ĝi postulas du personojn (virsek-sajn), kaj daŭras ĉirkaŭ unu horon en la prezentado. La verko estas sprita kaj meritplena, kvankam iom da penado necesas por ĝui la ludadon je dusencaj vortoj, kiu ofte fariĝas iom laciga. Paĝoj, 44; prezo, Sm. .20. Eldonita de nova hispana firmo, *Eldona Hispana Societo, Buenavista, 21, Valencia, Hispanujo.*

Esperanto Manuel.—Tiu ĉi bonega franca lernolibro,

redaktata de Srqj. Gabriel Chavat kaj Georges Warnier, nun aperas en la dua eldono, iom pligrandigita kaj plibonigita. Ĝi nun enhavas tute 143 paĝojn, kaj la prezo estas Sm. .40. Eldonita de *G. Warnier & Ko.*, 15, rue Montmartre, Paris.

Lernolibro de la Natura Stenografio Gabelsberger.
—Je la apero de tiu ĉi lernolibro nova germana esperanta firmo eniras la kampon internacian. La libro pritraktas, en 49 paĝoj de pli ol ordinara grandeco, Esperanton kaj la diritan sistemon de stenografio. Oni opinias ke la sistemo sin nomas “natura” ĉar la literoj kaj signoj iom similas la ordinarajn literojn uzatajn en la skribado. Eble ĝi estas “natura,” kaj se oni estas stenografisto oni certe devas posedi la libreton, kiu elspezigus al li .75 spesmilojn. Sro. G. Christoval, el Brunsvigo, elverkis ĝin, kaj ĝi estas eldonita de *Heckners Verlag, Wolfenbuttel, Germanujo.*

FAKO DE KORESPONDADO

Your name and address below, two issues, 25 cents.

*Oni deziras nur leterojn ; ° nur poŝtkartojn ilustritajn.

J. Cliff Anderson, Terre Haute, Indiana, U. S. A.

Harold Bunker, Merrick, N. Y.

Fno. Clara Todson, 23 The Spurling, Elgin, Ill.

H. E. Williams, Newtown, Mo.

°T. J. Brackett, Rfd. 1-17, Greenland, N. H.

Truman W. Pickens, Easley, S. C.

°Wm. T. Ross, Mound, Alta., Canada.

P. B. Glloldi, Tampico, Mexico.

°Marcel Lefevre, 11 St. Mare, Orleans, France.

Kosta Tv. Peĉigargeo, Plevna, Bulgaria.

°P. Manuel Jose Fernandez, Coŭto-Arcos de Valdevez, Portugal.

Michel Ambros, Ekateringofskij Pros., D. 12, kv. 31, St. Petersburg, Russia.

Konstantin Morev, Obvodnyj Kanalo 76^a, “Aempa,” St. Petersburg, Russia.

°Sro. Le Grignoux. 45, rue de l' Esperance, Paris, XIII.

°F. J. Macalik, I. U. S., Hamovu, Hungary.

°J. Jenĉ, Havliĉkova 37, Prag-Zizkov, Austria.

Karl Jost, Zwinglstr. 13, Zurich III, Switzerland.

°A. Zahel, Taboriska 19, Praha II, Bohemia.

Sro. Enauld, rue du St. Esprit, Verdun, Meuse, France.

Sro. Adam, 2, rue des Rouyers, “ “ “ “

Raoul Oury, Bloise, France.

R. Dousset, Arsonval, p. Bar-s-Aube, France.

Chr. Stoll, Hanau a-M., Germany.

°A. Garin, Avenida de la Estacion, Tolosa, Guipuzcoa, Spain.

FONOGRAF RECORDS

of exercises from the American Esperanto Book (Ekzercaro). Pronouncing exercises, La Feino, etc. Full information on request.

THAT PRESS COMMITTEE

Which was mentioned here two months ago, will soon be ready for business. Any person who can write respectable newspaper English may join, and we want a live one in each state. In the following list each state already represented is marked t :

tAlabama, tAlaska, Arizona, tArkansas, California, Colorado, Connecticut, Cuba, Delaware, District of Columbia, Florida, Georgia, Hawaii, Idaho, tIllinois, tIndiana, tIowa, tKansas, Kentucky, Louisiana, Maine, Maryland, Massachusetts, Michigan, tMissouri, Mississippi; Montana, Nebraska, Nevada, New Hampshire, New Jersey, New Mexico, tNew York, North Carolina, North Dakota, tOhio, Oklahoma, Oregon, tPennsylvania, Rhode Island, South Carolina, South Dakota, Tennessee, tTexas, Utah, Vermont, Virginia, tWashington, West Virginia, Wisconsin, Wyoming. *Canada*: Alberta, British Columbia, New Brunswick, Nova Scotia, Ontario, Quebec, Saskatchewan, Yukon.

We shall supply prepared, carefully edited newspaper "copy" to each member, and give a general course of training in amateur journalism. The space which we have used for Esperanto in daily newspapers during the past year would line to line reach twice around the earth. You can help! Write us that you will help in your home state!

Esperantisto, 1239 Michigan Boulevard, Chicago

SOME GOOD ESPERANTO READING

Can be had by sending *Amerika Esperantisto* one dollar for a dozen assorted copies of Esperanto magazines of European issue. Not more than two copies of any one publication. Get a dozen or two of these—a good way to select those you will want permanently on your list. Postage paid for \$1.00.

THEN THERE ARE THE POST-CARDS with the whole grammar of Esperanto (printed in English) on the back and plenty of writing space on the front. You know the law now permits us to use the left half of the front side for correspondence. Ten of these cards for ten cents, 100 50c.

W. B. Freadwell:

THE SECOND EDITION

of THE AMERICAN ESPERANTO BOOK is now in press. It contains sixteen pages of new matter, including Zamenhof's speech at Cambridge, some information as to the Esperanto money system, etc. The correlative words are printed in tabular form. No need to specify "revised edition" in your letter ordering a copy of this book. The first edition is all sold. You needn't hurry, but as our loving friends have bought 1109 copies of the new edition, if you get your order in now it will be delivered in three weeks.

STANDARD WORKS IN ESPERANTO

One Dollar each :

Hamlet, el Shakespeare, de Zamenhof.
Esperantaj Prozaĵoj, de kelkaj aŭtoroj.
Eneido, el Virgil, de Valliene.

Seventy-five Cents each :

Kondukanto kaj Antologio, de A. Grabrowski.
La Ventego, el Shakespeare, de A. Motteau.
Ŝi Kliniĝas por Venki, el Goldsmith, de A. Motteau.

Fifty Cents each :

Julio Cezaro, el Shakespeare, de D. H. Lambert.
Elektitaj Fabeloj, el Fratoj Grimm, de Kabe.
Don Juan, el Moliere, de Boirac.
Wilhelm Tell, el Schiller, de L. E. Meier.
Paŭlo kaj Virginio, tradukita de H. Holder.
Christmas Carol, el Dickens, de Dr. Martyn-Westcott.
Internacia Krestomatio, de Kabe.

Thirty-five Cents each :

Sep Rakontoj. Du Rakontoj, de D. de Rothan.
Rakontoj pri Feinoj, el D. Perrault, de Sino. Sarpy.
Blinda Rozo, el Hendrik Conscience, de Sino. Van
Melckebeke Van Hove.

Twenty-five Cents each :

La Fundo de l' Mizero, el V. Sieroŝevski, de Kabe.
L' Avarulo, el Moliere, de Sam Meyer.
Perdita kaj Retrovita, de E. Boirac.
Vojaĝo Interne de Mia Ĉambro, el X. Le Maistre,
de Sam Meyer.
Elektitaj Fabloj, el La Fontaine, de G. Valliant.
Majstro Jan Hus, de J. F. Kuhn.
La Interrompita Kanto, el Eliza Orzeszko, de Kabe.
La Predikanto, (Ecclesiastes), de Zamenhof.
Horacio, el Macaulay, de C. Bicknell.
Rip Van Vinkl, el Washington Irving.

AMERIKA ESPERANTISTO, CHICAGO, ILLINOIS